

# PREĜOJ POR LA MORTINTOJ

**Por la mortinta patro aŭ patrino**

Ho Sinjoro, kiu ordonis al ni honori la patron kaj la patrinon, igu Vin kompatema la plorinda stato de la animo de mia patro (aŭ mia patrino), kiu eble mizere ĝemas en Purgatorio; pardonu ĉiun ties eraron, kaj baldaŭ enkonduku lin/ ŝin en la gloron de l' Ĉielo.

Helpu ankaŭ min, por ke mi povu retrovi lin/ ŝin en la heleco de la eterna ĝojo. Tion mi petas de Vi pro la senfinaj meritoj de Jesuo Kristo Nia Sinjoro. Trifoje Eternan ripozon…

**Por sia edzo aŭ sia edzino**

Dio de ĉiuj virtoj, kiu altigante gedziĝon al la digno de Sakramento, instruis al ĉiuj geedzoj ami sin reciproke per amo simila al tiu kiu ligas Vin al Via Edzino la Sankta Eklezio, do neniam ĉesi havigi al si reciproke la veran bonon; dignu elaŭdi la preĝojn kiujn mi prezentas al Vi por la animo de tiu edz (in)o, kiun vi mem donis al mi por mildigo de la suferoj de ĉi tiu mizera vivo, kaj kiun Vi mem revokis al Via Sino, por instrui al mi meti nur en Vin mian esperon kaj mian kontentecon.

Ricevu kiel elpagon de liaj/ ŝiaj ŝuldoj, eble alprenitaj kaŭze de mi, tiun malmultan bonon, kiun mi faras por lia/ ŝia animripozo, kaj kiun mi intencas kunigi kun la meritoj de ĉiuj Sanktuloj, kun tiuj de Maria Sanktega, sed pli ol ĉio kun la senfinaj meritoj de Jesuo Kristo, per liberigi lin/ ŝin kiel eble plej baldaŭ el la ardaj flamoj de Purgatorio kaj flugigi lin/ ŝin al la ekposedo de la eternaj ĝojoj de l' Ĉielo. Jes, akceptu en Viajn brakojn tiun benatan Animon; kaj aŭskultante la preĝon kiun ĝi faras al Vi je mia favoro, faru ke mi vivu tiel sankte ke mi meritu esti kunigita al ĝi por la tuta eterneco en la Gloro. Trifoje Eternan ripozon...

**Por siaj fratoj kaj por siaj fratinoj**

Mia tre aminda Sinjoro Jesuo Kristo, kiu igis la fratan karitaton, kies plej perfektan modelon Vi prezentis en Vi mem, la unua devo kaj la unua distingilo de ĉiuj Viaj disĉiploj, liberigu el la penoj kiujn ili trasuferas kaj voku al la ekposedo de Via Gloro niajn fratojn kaj niajn fratinojn.

Vi, kiu degnis fariĝi nia pli aĝa frato prenante nian saman karnon, kaj altigante nin al la digno de filoj de Via Eterna Patro, ne pemesu ke estu longtempe disigitaj de Vi ĉi tiuj malpli aĝaj fratoj, kiuj kun nepriskribeblaj ĝemoj petas de Vi kompaton. Per la senfinaj meritoj de Via Pasiono kaj de Via Morto plivalorigu tiamaniere niajn preĝojn, niajn bonfarojn, niajn suferojn, kiuj utilas por elpagi ĉiujn ŝuldojn kiujn ili ankoraŭ havas kun Via Justico. Krome, postkiam ili ĝisatingos la posedon de Paradizo, elaŭdu la preĝojn kiujn ili prezentos por nia savo al la trono de Via mizerikordo; por ke ni povu ĝui porĉiame ilian kunulecon en la gloro, imitante ilian rezignacion kaj ĉiujn iliajn virtojn en ĉi tiu mizera vita. Trifoje Eternan ripozon...

**Por la parencoj kaj la bonfarintoj**

Ho Sinjoro, kiu plezuriĝas havigi facile kaj volonte la pardonon kaj amas la savon de la pekulo, turnu kompatan rigardon al la Animoj de miaj parencoj, geamikoj, bonfarintoj; kaj pro la meritoj de Jesuo Kristo, kiu por ni foroferas Sin en ĉi tiu Sankta Ofero, pro la neeldirebla patrina boneco de Maria, per la propeto de Sankta Jozefo, de la Anĝeloj, de ĉiuj Sanktuloj de la Ĉielo, faru ke baldaŭ ili gajiĝu en la eterna gloro de l' Paradizo. La eternan ripozon...

**Por karulo**

Aŭskultu, ho Sinjoro, miajn voĉojn per kiuj mi petegas Vian kompaton por la dezirata kaj kara Animo de… kiun Vi vokis el ĉi tiu ekzila tero. La Valorega Sango de Jesuo, kiun mi oferas al Vi en ĉi tiu Sankta Ofero, ĝin purigu el ĉiu makulo ricevita en la surtera pilgrimado; kaj pro Via senfina mizerikordo dignu konsenti al ĝi refreŝiĝon kaj pacon, allasi ĝin en la kunularon de la Sanktuloj, enkonduki ĝin en la eternan feliĉon, en la brilegon de Via Dia lumo. La eternan ripozon...

**Preĝo al Maria Sanktega por la plej forgesitaj Animoj de Purgatorio**

Ho Maria, kompatu tiujn povrajn Animojn kiuj, enfermitaj en la mallumegaj prizonoj de la pentofara loko, havas neniun surtere kiu zorgu pri ili. Dignu, ho bona Patrino, malaltigi kompatan rigardon sur tiujn forlasitajn; inspiru al multaj karitatemaj kristanoj la penson preĝi por ili, kaj serĉu en Via Koro de Patrino la manieron helpi al ili kompateme.

Ho Patrino de la ĉiama sukuro, kompatu la plej forlasitajn Animojn de Purgatorio. Mizerikorda Jesuo, donu al ili la eternan ripozon.

Trifoje Saluton Reĝino

*La sekva alvoko estas adresita al Dio Mizerikorda por ĉiuj animoj de Purgatorio.*

Ho Dio, ĉiopova kaj eterna, Sinjoro de la vivantoj kaj de la mortintoj, plena de mizerikordo al ĉiuj viaj kreitaĵoj, konsentu la pardonon kaj la pacon al ĉiuj niaj mortintaj gefratoj, por ke enmergitaj en vian beatecon ili laŭdu vin senfne. Per Kristo nia Sinjoro. Amen.

**Por la puriĝantaj Animoj**

Puriĝantaj sanktaj Animoj, preĝu al Dio por ni, kaj ni preĝos por vi, por ke Dio baldaŭ konsentu al vi la gloron de la sankta Paradizo.

**Por pluraj mortintoj**

Ho mizerikorda Dio, konsentu al (nomoj...) kaj al ĉiuj niaj gefratoj kiuj ripozas en Kristo la donacon de via paco, por ke liberaj de ĉiu kulpoŝuldo ili estu aligitaj al la gloro de la resurektinta Sinjoro, kiu estas Dio kaj vivas kaj regnas kun Vi, en la unueco de la Sankta Spirito dum ĉiuj jarcentoj da jarcentoj. Amen.

**Por unu mortinto**

Ni preĝpetas Vin, Sinjoro, Patro sankta, Dio ĉiopova kaj eterna, por la fidela animo de (nomo), kiu pro via volo forlasis ĉi tiun mondon: degnu akcepti lin/ ŝin en la lokon de refreŝiĝo, de lumo kaj de paco. Estu al li/ ŝi konsentite transpasi la pordojn de morto kaj ĝisatingi la loĝejon de la beatuloj en la sankta lumo, kiun iam Vi promesis al Abrahamo kaj al lia idaro. Lia/ ŝia animo ne plu trasuferu iun ajn penon, kaj kiam venos la granda tago de la resurekto kaj de la rekompenco, degnu, ho Sinjoro, revivigi lin/ ŝin kune kun viaj Sanktuloj kaj elektitoj; pardonu al li/ ŝi ĉiujn liajn/ ŝiajn mankojn kaj pekojn, por ke en Vi li/ ŝi povu akiri la senmortan vivon kaj la eternan regnon. Per Kristo nia Sinjoro. Amen.

***

Ho Dio, kiu partoprenigis nin en la mistero de Kristo krucumita kaj resurektinta por nia savo, faru ke nia frat(in)o (nomo), liberigita de la ligoj de la morto, estu kunigita al la komunumo de la Sanktuloj en la eterna Pasko. Per Kristo nia Sinjoro. Amen.

Ho Dio, vivo de mortantoj kaj beateco de kredantoj je Vi, rigardu kun boneco al nia frat(in)o (nomo), kiun la morto forŝiris al la amemo de liaj/ ŝiaj karuloj, kaj akceptu lin/ ŝin en la serenan gastigadon de via domo. Per Kristo nia Sinjoro. Amen.

Dio, nia Patro, aŭskultu la preĝon de via Eklezio kaj akceptu en la pacon nian frat(in)on (nomo). Vi kiu kreis lin/ ŝin laŭ via bildo kaj en la Bapto igis lin/ ŝin via adopta fil(in)o, igu lin/ ŝin partoprenanto en via heredaĵo. Per Kristo nia Sinjoro. Amen.

**Por mortinta Pastro**

Sinjoro mizerikorda, kia al via servanto (nomo), Pastro, dum la tempo de lia restado inter ni, konfidis vian vorton kaj viajn sakramentojn, donacu al li ĝojegi por ĉiam en la liturgio de l' ĉielo. Per Kristo nia Sinjoro. Amen.

**Por juna mortinto**

Ho Dio, kiu konas kaj pridisponas la momentojn de la homa vivo, Vi vidas la doloron de ĉi tiu via familio pro la morto de nia frato (nomo), kiu en tiom mallonga tempo finis sian surteran ekziston: ni lin konfidas al Vi, Patro bona, por ke lia juneco denove ekfloru apud Vi, en via domo. Per Kristo nia Sinjoro. Amen.

**Por mortinto pro subita morto**

Ho Dio, nia Patro, konsolu nin per la forto de via amo, kaj prilumu nian aflikton per la serena certeco ke nia nia frato (nomo), forŝirita al siaj karuloj de subita morto, vivas feliĉa por ĉiam apud Vi. Per Kristo nia Sinjoro. Amen.

**Preĝo por la mortintoj**

Dio de la spiritoj kaj de ĉiu karno, kiu detruis la morton kaj neniigis la diablon kaj donacis la vivon al via mondo; same Vi, ho Sinjoro, donacu al la animo de via mortinta servanto (nomo) la ripozon en loko luma, en loko verdabunda, en loko de freŝeco, de kiu estas malproksimaj sufero, doloro kaj ĝemado. Vi, Dio bona kaj korfavora, pardonu ĉiun kulpon de li faritan per vortoj, per faroj aŭ per penso; ĉar ne ekzistas homo kiu dum vivo ne pekas; ĉar nur Vi estas sen peko, kaj via justeco estas justeco dum jarcentoj kaj via vorto estas vero. Ĉar Vi estas la resurekto, la vivo kaj la ripozo de via mortinta servanto (nomo), ho Kristo nia Dio, ni gloras Vin, kune kun via samnatura Patro kaj via Sanktega Spirito bona kaj viviganta, nun kaj ĉiam dum jarcentoj da jarcentoj. Amen.

**Akto de akcepto de morto**

Sinjoro mia Dio, ekde nun mi volas ame submetiĝi al via sankta volo, kaj akceptas el viaj manoj ĉiun ajn specon de morto kiun Vi volos sendi al mi, kun ĉiuj doloroj kiuj akompanos ĝin. Tion mi oferas al Vi en unuiĝo kun la agonio kaj la morto de nia Savanto Jesuo Kristo. Jesuo, mortinta por mi, konsentu al mi la gracon morti en ago de perfekta karitato al Vi. Sankta Maria, Patrino de Dio, preĝu por mi nun kaj en la horo de mia morto. Sankta Jozefo, havigu al mi morti per la morto de la justuloj. Amen.

Tradukis: Antonio De Salvo (11.2016) Aranĝo: IKUE (MB 2016)